

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la vivo en svisa montara vilaĝo.

La svisa montaro Ĵuraso estas escepto koncerne la kutimajn geografiajn leĝojn. La historio de La Sagne permesas analizi la kaŭzojn, kiuj instigis al homoj kontraŭstari naturajn leĝojn.

Ĵuraso klimato ne estas alloga. Pro tio nur kelkaj pasejoj estis frue loĝataj. Por vidi pionirojn alveni ĉe la altaj valoj de la montaro, oni devos atendi la dekkvaran jarcenton, kiam revoluciuloj preferos forlasi siajn bienojn ĉe urbeto, kie la feodalaj sinjoroj malpermesas la starigon de popolkunvenoj, ol rezigni pri siaj demokrataj ideoj. Ili elektis la altajn ĵurasajn valojn, kie ili kreis demokratajn komunumojn. En tiu epoko oni ne jam povis rifuĝi al Ameriko, kiu ne jam estis konata. Sed la terpomoj do ankaŭ ne estis konataj. Kaj greno ne povis bone kreski en tiuj valoj. Do, por vivteni sin, necesis komerci.

Dum la homoj bredis grandajn bovinarojn kaj fabrikis fromaĝojn, iliaj edzinoj puntis. Vintre la homoj skulptis la lignon. Fromaĝojn, punktojn, skuptaĵojn ili vendis kontraŭ greno kaj salo. Por tion fari, ili devis konstrui straton. La Sagne situas inter du altaj montaroj. La strato do devis transiri du tre deklivajn pasejojn je 1400 kaj 1300 metroj de alteco. Tiu strato permesis veturigi salon kaj tritikon ĝis Berno el Francio. Ĝi alportis plian gajnon al niaj vilaĝanoj, ĉar La Sagne fariĝis ripozejo inter tiuj du pasejoj.

Dum la longaj sesmonataj vintroj niaj montanoj havas multe da tempo por diskuti. Kaj la strato alportas ne nur salon kaj grenon, sed ankaŭ novajn ideojn. Oni povas do kompreni, kial ĉe la komenco de la dekseca jarcento tiu popolo estas matura por religia revolucio. La reformacio okazas en La Sagne en 1532, je kelkaj dekoj da jaroj post la inaŭgurado de la nova flamgotika preĝejo. Oni malfermas lernejon, kiu funkcias dum la vintroj. Post kelkaj jaroj ne nur la infanoj, sed la plimulto de la plenkreskuloj scipovas legi la Biblion.

Oni rakontas, ke en 1679 ĉevalbredisto nomata Péter alportas al juna seruristo poŝhorloĝon, kiu ne plu funkcias. Tiu junulo, kiu nomiĝas Daniel Jean-Richard, ne nur riparas la horloĝon, sed kopias ĝin. Estas tiel, ke la horloĝfabrikado naskiĝis en La Sagne, kaj el tiu vilaĝo disvastiĝis iom post iom en la tutan ĵurasan montaron. Daniel Jean-Richard forlasos la vilaĝon por la najbara komunumo Le Locle. Estas en tiu najbara valo, ke formiĝos iom post iom du grandaj urboj : Le Locle kaj La Chaux-de-Fonds.

La skulptistoj facile sin adaptas al la horloĝfabrikado. Kaj tiu industrio alportas sufiĉe da gajno por permesi al la filoj de la bredistoj ne forlasi la montaron. Ĉiuj trovas sufiĉe da laboro.

Jean-Jacques Rousseau vizitante nian regionon miras pri la ekzisto de tiuj montaraj komunumoj, kiuj progresas malgraŭ malfavora klimato. Li ankaŭ konstatas, ke la montanoj havas fortan originalan personecon. Tiuj homoj multe diskutas kaj legas. Rousseau fariĝos unu el iliaj preferataj aŭtoroj kun Voltaire kaj la enciklopediistoj, tio malgraŭ la kontraŭstaro de la pastoroj. Tiuj montanoj estas viglaj protestantoj, sed protestantoj, kiuj ofte dubas. Ili disputas dum generacioj pri la eterneco aŭ neeterneco de la inferaj punoj. Sed iom post iom tiuj diskutoj forlasas la religian kampon, por la sociala. La franca revolucio trovas varmegajn partianojn en La Chaux-de-Fonds kaj terurajn malamikojn en La Sagne, kie la bredistoj plimultas kompare al la horloĝistoj.

Sub la napoleona regado kaj la franca okupado La Sagne-anoj ne reagis. Sed ekde 1815, kiam la lando Neuchâtel refariĝas princlando kun la prusa reĝo kiel princo, sed samtempe fariĝas svisa kantono, La Sagne-anoj ne akceptas la ŝanĝon. Ili ne volas, ke la lando fariĝu svisa kantono. Ili timas perdi siajn demokratajn liberecojn, kiujn la prusa reĝo ĉiam rekonis.

Kiam en 1848 la lando Neuchâtel fariĝas respubliko post revolucio kaj ne plu rekonas la povon de la prusa reĝo, en La Sagne oni furioziĝas. Oni organizas sin, kaj en 1856 la Sagne-anoj faras kontraŭrevolucion. Dum tri tagoj ili estras la kantonon, kiu refariĝas prusa posedaĵo. Federala armeo devigis la Sagne-anojn retiriĝi el la kantona kastelo. Dum du monatoj tiu armeo okupis nian vilaĝon serĉante en la domoj la armilojn. Hodiaŭ en tuta Svislando oni mokas pri nia vilaĝo koncerne tiun kontraŭrevolucion.

Oscar Huguenin, kiu naskiĝis en La Sagne en 1842, vivis tiun militan okupadon. Poste, kiel verkisto li priskribis la spirito-staton de niaj vilaĝanoj dum la antaŭrevolucia epoko. Liaj libroj estas ankoraŭ hodiaŭ tre konataj kaj ŝatataj, ne nur en la vilaĝo, sed en la tuta kantono Neuchâtel.

Ekde la komenco de nia jarcento okazas ĉiujare en nia vilaĝo grava manifestacio. Ĝin organizas la protestanta kamparana junularo. Centoj da junaj kamparistoj regule grupiĝas en La Sagne por diskuti siajn problemojn. Ili ofte kun kuraĝo helpis la socialan progreson en la ĵuraso montaro. Tiuj regulaj restadoj kamparanaj famigos nian vilaĝon kaj iom riparos la kontraŭrevolucion agadon.

Kiel mi menciis ĉe la komenco de tiu prelego, la montaro ne povas nutri siajn loĝantojn. Sed la unuaj pioniroj ne venis por kultivi, sed por defendi siajn ideojn. Hodiaŭ ankoraŭ la ĵurasanoj estas konataj en Svislando kiel revoluciuloj. Ili devas batali kontraŭ malmilda klimato. Ilia vivo estas preskaŭ artefarita kaj dependas de ilia kuraĝa energio. Ili estas idealistoj, kiuj pensas, ke per kuraĝa energio oni ne nur povas vivi sur montaro, sed ankaŭ konstrui pli homecan mondon. Kaj ili reprezentas en Svislando la pacistan tendencon.

Vi aŭdis la kvaran kaj lastan prelegon de Claude Gacond pri la vivo en svisa montara vilaĝo. Se vi deziras ricevi bildon de tiu vilaĝo La Sagne, tiam skribu al Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-